



## Tagordo punkto 4 - Agadraporto pri 2023

### Agadraporto de Esperanto Nederland pri 2023

#### 1. Banko/kapitalo

Esperanto Nederland havis deficiton de la kapitalo en 2023 de € 6.974.

La ĉefa kialo estas punktoj kaj juraj kostoj pro uzo de kopirajta foto, vojaĝkostoj de instruanto de antaŭaj jaroj, la kostoj por la amsterdama katedro kaj pli altaj kostoj por Fenikso kaj la studsemajnfinoj ol buĝetite.

La propra kapitalo de la asocio estis je la 31-a de decembro 2023: € 86.391

La defcito estas 7,5% inkluzive la kostojn por la amsterdama katedro.

Kiel sekureco en kazo de malsano aŭ io simila, ankaŭ Ralph Schmeits estas rajtigita por bankaj aferoj.

*Raportas Loes Demmendaal*

#### 2.1. Estraro

La estraro konsistis en 2023 el:

Marc van Oostendorp, prezidanto, li estas elektita dum la jarkunveno 2022.

Peter van Noorden, membro, estas elektita dum la jarkunveno 2022

Loes Demmendaal, kasisto, estas re-elektita ĝis 2025. Estas ŝia tria periodo.

Ineke Emmelkamp estas sekretario (ĝis aprilo 2024). Rob Groeneveld ĉeestas la estrarkunsidojn kaj faras la raportojn,

La estraro kunvenis 8 fojojn (7 pere de Zoom kaj 1 fizike en Utrecht). Okazis multaj kontaktoj pere de retmesaĝoj kaj telefonalkvokoj,

Esperanto Nederland havas pagitan konton ĉe Zoom. La estraro kaj la organizantoj de la kunvenoj de la amsterdama Rondo uzas ĝin. Bert de Wit uzas ĝin por interretaj kursoj.

#### 2.2. Privacybeleid Esperanto Nederland

La teksto pri la politiko rilate privatajn aferojn troviĝas en la retejo de Esperanto Nederland.

#### 2.3 Membrokunveno

La 32-a ĝenerala kunveno okazis la 10-an de junio 2023 en la ejo Kargadoor en Utrecht.

Dum la posttagmeza programo Tobias Kazmierski prelegis pri la aranĝo Arkones (Pollando).

##### 2.3.1 Membroj

La administradon de membroj prizorgas Koos Scharroo. Li sendas bonvenigan paketon al novaj membroj, disponigas aktualan adresaron al la ekspedisto, kiu dissendas Fenikson, kaj li informas la estraron kaj redakcianojn de Fenikso pri ŝanĝoj en la membraro.

Laŭmende li havigas publikan membroliston, prefere en cifereca formo pro mediprotektaj kialoj.

### LEDENADMINISTRATIE ESPERANTO NEDERLAND 2023

| MUTATIES         | aantal |  |
|------------------|--------|--|
| BESTAND 1-1-2023 | 213    |  |
| NIEUWE LEDEN     | 16     |  |

|                           |               |          |
|---------------------------|---------------|----------|
| OPZEGGINGEN, ROYEMENTEN   | -10           |          |
| OVERLEDEN                 | -4            |          |
| <b>BESTAND 31-12-2023</b> | <b>215</b>    |          |
|                           |               |          |
| <b>LEEFTIJDEN</b>         | <b>aantal</b> | <b>%</b> |
| < 30 JAAR                 | 6             | 2,79%    |
| 30 T/M 69 JAAR            | 103           | 47,90%   |
| ≥70 JAAR                  | 104           | 48,37%   |
| GEEN OPGAVE               | 2             | 0,93%    |

#### 2.4. Arkivo Esperanto Nederland – Internacia Instituto por Socia Historio (IISG)

En 2023 finfine eblis havigi arkivojn al IISG. Montriĝis ke ne (plu) oni akceptas arkivojn de lokaj kluboj. Tial arkivo de “La Fajrero” sekcio Leiden de `FLE` (Bond van Arbeiders-Esperantisten) estas sendita al Erfgoed Leiden en Omstreken. La arkivo estas tre bone prizorgita de Marie J.Kardol. Ĝi enhavas la periodon 1945 - 2020. Peris Benata Hengstmengel-Koopmans. Dank'al Loes Demmendaal la arkivo atingis la regionan instituton.

Loes havigis al IISG dokumentojn kiuj rilatas la laboron de ŝia patrino por la landaj Asocioj FLE kaj Esperanto Nederland.

Mi proponis arkivon pri Een School in Togo. Kvankam la klopodoj akiri la necesajn financojn estas faritaj en Nederlando far Hans Bakker, ankaŭ tiuj dokumentoj ne plu estas interesaj por IISG. Ili do atingis Bibliotekon Hector Hodler en Rotterdam. Klaras ke IISG ŝanĝis sian akcept-politikon. Plej versajne pro spaco-manko. Se vi havas arkivon de loka klubo kaj se vi deziras ĝin “en profesiaj manoj”, bonvolu kontakti pri tio vian komunuman au regionan/provincan instancon pri arkivaĵoj.

*Raportas Ans Bakker-ten Hagen.*

#### 2.5. Biblioteko Universitato de Amsterdamo

La asocio decidis ke ĉiun jaron ni donacas valorajn librojn al la Biblioteko, maksimume € 100,-- jare. Prof. Federico Gobbo transdonas la librojn al la biblioteko.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

#### 2.6. Komerca Ĉambro

La asocio estas oficiale registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Amsterdamo. La registriĝo estas senpaga.

#### 3.1. Kaskontrolo

La kaskontrola komisiono konsistis el Ronaldo Nobel kaj Smaranda Tintu kiuj kontrolis la jaron 2022. La nova kaskontrola komisiono konsistas el Smaranda Tintu kaj Ans Bakker. Rezerva membro estas Mariska de Jonge.

*Raportas Loes Demmendaal*

#### 3.2. Arbitracia komisiono

Anneke Schouten-Buijs estas membro ĝis 2025.

Johan Swenker estas membro ĝis 2023. Li estas reelektita (2023 -2026).

La nova membro fariĝis Hiddo Velsink (periodo 2022-2025). Ans Bakker estas rezerva membro.

En la jaro 2023 ne necesis agi.

### 3.3. Verloren van Themaatpremio

En 2023 Foppe-Klaas Hovinga ricevis la premion pro sia laboro por Fenikso, kiu enhavas bonajn informojn pri Esperanto. Interesiĝantoj pri Esperanto trovas multajn interesajn tekstojn, en la nederlanda lingvo aŭ/kaj Esperanto.

### 4. Informado

En 2023 mi ricevis 31 informpetojn pere de la retejo. En la jaro 2022 mi forsendis 30 kovertojn. Pluraj membroj petis stokon de nia informmaterialo por disdoni.

Niaj du grandaj informiloj estis uzataj en kelkaj aranĝoj, i.a. dum la kultura tago en Maastricht kaj la studosemajnfinoj.

La 27an de junio okazis kongreso de Onze Taal en Haarlem, Esperanto Nederland havis informbudon tie. Andries Hovinga alportis materialon por tiu ĉi budo. Ankaŭ Ans Bakker kaj Karina Scharff deĵoris en la budo.

En 2023 aperis artikoloj en ĵurnalo **Het Parool** pri la tradukado de la libro de Baantjer kaj pri la amsterdama rondo (intervjuoj kun Peter Ebenau, Ans Bakker, Federico Gobbo kaj Bert de Wit) kaj en la revuo **De Groene Amsterdammer** aperis fine de la jaro artikolo pri Esperanto en kiu ĉefrolas profesoro Federico Gobbo.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

### 5. Instruado

#### 5.1 Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo.

La universitata kurso de Esperanto de la akademia jaro 2023-2024 okazis ĉeeste, samkiel en la antaŭpandemia epoko. Surpapere aliĝis 14 studentoj, sed prezentiĝis enklase 11. Ĉiuj trapasis la ekzamenon. Ĉirkaŭ duono el la studentoj estis nederlandanoj, la alia duono venis ĉefe el EU-landoj. La katedrulo estis invitita kiel gasto por prelegi pri la Esperanto-Movado en Nederlando kaj Kostariko el diversaj universitatoj, ĉeeste aŭ virtuale. Li publikigis esplorrezultojn kiel kutime.

Plendetala jarraporto estos sendita kopie porkone al la estraro de Esperanto Nederland je la fino de januaro 2024, ĉar tiam finiĝas la dua mandato. La tria mandato komenciĝos regule je februaro 2024 kaj daŭros 5 jarojn. Esperanto Nederland finance kaj morale subtenas la katedron.

*Raportis Federico Gobbo.*

#### 5.2. Studosemajnfinoj

En la jaro 2023 ni denove organizis du studosemajnfinojn en la naturamika domo Krikkenhaar apud Almelo. La unua okazis je 28-30 de aprilo kun 30 partoprenantoj. Instruis Rob Groeneveld, Fransuaz Balza, Bert de Wit, Alex Humet kaj Federico Gobbo. Du partoprenantoj ricevis financan subtenon de Internacia Esperanto-Instituto. La dua okazis je 13-15 de oktobro kun 31 partoprenantoj. Tiam instruis denove Rob, Bert, Federico, kaj krome Roel Haveman kaj Paweł Fischer-Kotowski. Ankaŭ ĉi-jare la organiza teamo konsistis el Ineke Emmelkamp, Lilian van der Burgt kaj Arjen-Sjoerd de Vries.

Marieke de Haas kunlaboris en la kuirejo kaj Anne-Marie Hoeben prizorgis la veturigadon inter la stacidomo kaj Krikkenhaar.

Dum la membrokunveno de Esperanto Nederland oni preparolis la financan staton de la studosemajnfinoj, kiuj montras sufiĉe grandan deficiton. Oni ĝenerale konsentis ke ĉi tiuj aranĝoj estas tre valoraj por la asocio, kaj ke indas daŭre investi en ili. Tamen, por minimumigi la deficiton, oni ankaŭ decidis plialtigi la aliĝkotizojn por la sekva jaro, kaj alvokis la organizantojn varbi prefere instruistojn kiuj loĝas en (aŭ proksime al) Nederlando kaj havas relative malaltajn vojaĝkostojn. Problemo kiu evidentiĝis dum la aprila semajnfino estis la novaj aranĝoj en Krikkenhaar rilate purigadon, pro kiuj ni ne povis uzi la kromdometon 't Krikske dimanĉposttagmeze. Feliĉe la vetero

estis bela, do eblis transloki la lecionojn en la subĉielan spacon. Ĉar ni tamen ne povos ĉiam kalkuli je tia bonŝanco, estis decidite lui la kromdometon unu tagon pli longe en la estonteco.

*Raportas Arjen-Sjoerd de Vries*

### **5.3 Kursoj**

Okazas kursoj, retaj kaj parolaj kursoj. Grupo da progresantoj regule kunvenas per ZOOM por plibonigi siajn sciojn pri Esperanto. Tiu grupo estiĝis post la forfalo de semajnfina kurso en '21 kaj ĝin organizas Bert de Wit,

Jam dum 18 jaroj Koos Scharroo prizorgis kurson por komencantoj en la retejo *Pingveno.nl*. Kursanoj sendas la faritajn ekzercojn, kiujn Koos korektas. Intertempe ĉ. 350 homoj eklernis. Pluraj sukcesas kaj fariĝas entuziasmaj esperantistoj.

### **6. Fenikso**

Ses numeroj de Fenikso estis publikigitaj en 2023. Papere tiuj ĉi revuoj estis senditaj al la membroj. Fenikso estis sendita al kelkaj pluraj adresoj eksterlande. Unu monaton poste ĝi estis ankaŭ metita en la retejon de Esperanto Nederland.

Ni publikigis raportojn pri la studosemajnfinoj kun multaj fotoj kaj pri la Kultura Tago en Matriĥto. Ni havis unuan intervjuon kun ne-homo, ChatGPT. Ni reiris en la tempo al la itala enmigrinto Angelo Agosti, kiu estis aktiva en la rezistado dum la Dua Mondmilito, kaj antaŭeniris en tempo per sekva rakonto pri 3510. Tiam Esperanto ankoraŭ estas uzata. Neesperantistoj nun uzas Esperanton, kiel muzikgrupo Dianto Reed Quintet kiuj parolas pri Esperanto dum siaj prezentadoj kaj AMO Streetfood kiu donis al sia manĝejo esperantan nomon. Pri ambaŭ ni raportis.

Ĉi-jare esperantistoj uzis Esperanton por krei librojn: la libro Baantjer kaj poemoj el aliaj eŭropaj landoj estis tradukitaj. La muzikgrupo Kajto plibeligis la feston pro la 40-jariĝo de la lernejo La Granda Ursino en Svislando. Ni publikigis plurajn mesaĝojn de UEA zorgi pri la Tero kaj la homoj, kiuj loĝas sur ĝi.

Ĉi tiuj estas nur kelkaj artikoloj el la riĉa enhavo, kiujn ni publikigis en 2023. Kune kun la partoprenantoj Ineke Emmelkamp, Benata Hengstmengel-Koopmans, Arjen-Sjoerd de Vries kaj Det Koning, kiuj provizis la regulajn rubrikojn, kaj kun Marc Konijnenberg, Bert de Wit, Andries Hovinga kaj Foppe-Klaas Hovinga, kiuj redaktis la revuon, kaj kun ĉiuj, kiuj sendis artikolojn, ni faris belajn numerojn de Fenikso.

La gazeto estas presita kaj forsendita pere de Flandra Esperanto Ligo en Antwerpen (Belgio). La numero 2/23 erare estis du fojojn presita kaj forsendita. FEL agnoskis la eraron kaj ne enkontigis la kostojn al Esperanto Nederland.

*Raportas Foppe-Klaas Hovinga, ĉefredaktoro*

### **7. Interreto**

#### **7.1. Retejo Esperanto Nederland**

En 2022 la asocio estigis planon konstrui novan retejon.

Estas formata laborgrupo por plilabori novan retejon, kaj la laborgrupo kaj estraro esperas povi montri unuan version de ĝi dum la jarkunveno en 2024.

#### **7.2. Sociaj komunikiloj**

La sociaj komunikiloj de Esperanto Nederland konsistas el: Fejsbuka paĝo, Tvitiera-konto, Jutuba kaj Telegrama kanaloj. Ni publikigis tie anoncojn, raportojn kaj fotojn pri Esperanto-aranĝoj en Nederlando kaj la plej interesajn novaĵojn pri internaciaj Esperanto-eventoj en kiuj ĉeestas Esperantistoj el Nederlando. Administrantoj de la sociaj komunikiloj: Andries Hovinga kaj Joost Franssen. Kunlaboris: Ineke Emmelkamp.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

## 8. Universala Esperanto Asocio (UEA)

Dum la jaro 2023 ni ne havas komitatanojn ĉe UEA. Ni ne trovis kandidatojn.

## 9. Faka sekcio NGGE - *Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj*.

NGGE. estas la Nederlanda sekcio de "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj". La estraro ĉiam konsistas el s-ro Rob Moerbeek, prezidanto kaj s-ro Simon Smits, sekretario kaj kasisto. Ili kunvenis ĉeeste kaj de tempo al tempo ili havas telefonan kontakton. Rob Moerbeek estas la komitatano ĉe UEA.

La membronombro fine de 2023 sumiĝis je 8. La membroj ricevas la informbultenon 'NGGE sciigas' (ankaŭ sendita al kelkaj aliaj personoj kaj instancoj) kaj la Internacian pedagogian Revuon. NGGE sciigas aperas trifoje en jaro, po 8 paĝoj.

## 10. Regionaj memstaraj grupoj

Grupo de homoj povas unuiĝi kaj sekve iri al notario por ekhavi juran staton. Poste sekvas enskribiĝo ĉe la Ĉambro de Komerco (Kamer van Koophandel). Tia asocio devas sekvi la regulojn de la Civila Kodo (Burgerlijk Wetboek). Esperanto Nederland estas tia asocio, kiu povas fondi sekciojn, kiuj mem ne havas juran respondecon. Tiaj sekcioj funkcias sub la plena respondeco de la (ĉef)estraro. Ĝis nun ni ne konsciis pri la financa respondeco, kio signifas ke ĉiu sekcio devus ĉiujare detale raporti al la estraro pri siaj financoj. La estraro tial decidis ke lokaj kluboj kaj aliaj grupoj ne estu oficialaj sekcioj, sed memstaraj organizoj, kiuj mem prizorgas sian financan aŭtonomecon. Konkrete ne multe ŝanĝiĝos, ĉar kompreneble Esperanto Nederland daŭre kunlaboros kun ĉi tiuj grupoj.

### 10.1 Alkmaar

La estraro konsistas el: s-ino Tiny Droge, prezidanto, kiu demisios en 2026, s-ino Margot Koopmans, vic-prezidanto, kiu demisios en 2024. S-ro John Droge, kasisto, kiu demisios en 2025. La estraro kunvenis 5 fojojn.

Ni kunvenis en la kvartaldomo de Alkenhorst, salono Kiekendief. Meznombra partoprenantaro: 8 personoj. La nombro da membroj Je la 31-an de decembro 2023: 19.

Klubkunvenoj: 9 foje.

Nia ĥoro Malvo konsistis el 8 membroj, inkluzive la dirigentinon Marijke Lathouwers. De septembro ni ne kunkantis.

Nia gazeto Fromaĝokloŝo aperis 2 fojojn, prizorgita de Vinus Lathouwers. Ni sendis nian klubrevuon al nova membro kaj eksterlande al niaj ĝemelurkluboj.

Temoj de nia kunvenoj:

La 18-an de januaro: ni parolis pri filmoj kiujn ni vidis.

La 20-an de februaro: jarkunveno, La kasisto prezentis la financan jarrapoton. Poste ni ludis esperantlingvajn ludojn

La 20-an de marto: la temo de la vespero estis 'plasto'. Post la paŭzo estis prelego pri la problemoj kion kaŭzas la plasto en la naturo.

La 25-an de aprilo: Ni elektis karton sur kiu estis foto de situacio. Ĉi tiuj kartoj estas uzataj por paroli kun infanoj (aŭ plenkreskuloj) pri emocioj

La 1-an de septembro: malfermo de la sezono per kradrostado en ĝardeno

La 18-an de septembro: ni priparolis niajn spertojn dum la lastaj monatoj. Kio estis bona, kio malpli? Post la paŭzo ludo.

La 16-an de oktobro: la temo estis La trafiko (estis la semajno de la 'sekureco')

La 20-an de novembro: la temo estis simboloj.

La 18-an de decembro: ni festis la naskiĝtagon de D-ro. Zamenhof .

### 10.2 Esperanto Klubo Eindhoven (EKE)

Ni kunvenis 10 fojojn en *De Uitwijk* en Eindhoven.

Ĉiam la 3-an merkredon de la monato, escepte de julio kaj aŭgusto.

Kiel kutime ni ludis skrablon en januaro, festis la Zamenhoffeston en decembro kaj parolis pri la ferioj en septembro. Cetere ni verkis pri paronimoj en februaro, pri poemoj kaj anglismoj en marto kaj oktobro. Ralph preparis hakitajn rakontojn en aprilo, kaj en junio, ni parolis pri niaj plej ŝatataj libroj. Tonnie faris (denove) vortenigmojn kiujn ni provis solvi (majo) kaj en novembro ni vojaĝis tra Eŭropo pere de la ludo “La granda vojaĝo” (de Lode van de Velde)

Averaĝe ni estis kun 6 ĝis 9 personoj.

Membroj de nia klubo partoprenis ankaŭ jenajn eventojn:

- IFEF kongreso (Antwerpen, BE)
- UK (Torino, IT)
- Beneluksa kongreso (Bouillon, BE)
- Kokolores (Schwerte, DE)
- Kultura tago (Maastricht)
- Oficiala lanĉo de la libro “De Cock kaj la murdo en preĝo” (Amsterdam)
- Studsemajnfino (Bornerbroek)
- Printempa Semajno Internacia (Lutherstadt Wittenberg, DE)
- Luminesk’ (Heilbronn, DE)

Nia membro Karina Scharff eldonis libon: “Poetische taalmethode voor het leren van de internationale taal Esperanto” (en iedere andere taal). Ĝi enhavas poemojn de famaj verkistoj el preskaŭ ĉiu eŭropa lando en la originala lingvo, la nederlanda kaj en esperanto.

*Raportas An Olijslagers*

### **10.3 Noord-Nederland**

La 31an de decembro 2023 ni havis 23 membrojn, inkl. unu honoran membron Wil van Ganswijk. Ineke Emmelkamp restis prezidanto/sekretario kaj Richard Hofman estis la kasisto ĝis nia membrokunveno. Ni serĉas novan kasiston, sed intertempe Richard prizorgas la financan administradon. Nia novaĵletero La Steleto ne aperis ĉijare, sed Ineke forsendis plurajn retmesaĝojn al la membroj. Bedaŭrinde ni ne organizis informbudojn. Gonda Kruijer fidele sendas al niaj membroj gratulkarton okaze de naskiĝtagdatreveno.

Ni kunvenas du fojojn monate, unu fojon fizike, la alian pere de Zoom. Ni mencias niajn kunvenojn en la retejo Eventa Servo. Regule partoprenas alilandanoj al la Zoom-kunvenoj.

En la somero ni organizis matenajn kunvenojn en Groningen.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

### **10.4 Haarlem**

Oficiale la grupo en Haarlem ankoraŭ ekzistas. Ne okazis oficiala membrokunveno por malfondi la klubon. La restanta mono jam estas transpagita al Esperanto Nederland. Ni nuligis la ING-konton.

*Raportas Bert de Wit*

### **10.5 La Amsterdama Rondo**

La kunvenoj de la Amsterdama rondo okazas kutime en la dua dimanĉo de la monato, sed en ĉi tiu jaro okazis trifoje (aprile, novembro kaj decembre) en la tria dimanĉo de la monato. Ni kutimas rekte elsendi la kunvenojn per ZOOM, tiel ke ankaŭ geesperantistoj kiuj ne povas tiel bone vojaĝi aŭ estas en aliaj landoj, povu partopreni en la kunvenoj. La projekciilo (posedaĵo de ESPERANTO NEDERLAND) gastas ĉe Peter Ebenau. Li transprenis tiun taskon de Miko Kuijn.

En januaro parolis Pavel Fischer-Kotowski, eks-redaktoro de la revuo Kontakto, pri homaj rajtoj.

En februaro Arjen-Sjoerd de Vries testis nian lingvoscion pri Esperanto. Kaj en marto Bert de Wit prezentis la duan parton de la kvizo pri prepozicioj.

En la 16a de aprilo ni lanĉis la Esperanto-tradukon de « De dood in gebed », krimromano de Baantjer, kiun grupo da kunlaborantoj kun tradukis. La lanĉo okazis en la famkonata kafejo « Loewietje »(Luĉjo) en La Jordaan-kvartalo. Ans Bakker-ten Hagen kaj Peter Ebenau preparis la kunvenon kiu estis tre sukcesa kaj eĉ atingis la paĝojn de la ĵurnalo Het Parool. Ans zorgis pri la financoj. Legu la antaŭajn ampleksajn raportojn pri tiu evento.

En la maja kunveno parolis al ni i.a. Ĥor pri siaj spertoj kiel rifuĝinto el la ukraina urbo Ĥarkivo. Samtempe ni retrorigardis al la tuta projekto pri la tradukado de la krimromano de Baantjer, al kiu partoprenis pluraj personoj el kaj ekster Amsterdamo. La PDF de la traduko estas trovebla en la interretaj paĝoj de Esperanto Nederland.

En junio Leston Buell instruis nin kiel oni povas desegni kaj pentri belajn elefantojn.

John Magessa el Tanzanio en julio venis al Amsterdamo por prelegi pri preparlaboroj por la venontjara universala kongreso en Aruŝo, Tanzanio. Li estas membro de LKK, la Landa Kongresa Komitato. Per subvencio de Institucio Hodler '68 li kaj kelkaj aliaj Afrikanoj povis ĉeesti la UK-on en Torino kaj aliajn Esperanto-eventojn. Tiel ili spertiĝis pri la organizado de tiaj grandaj kongresoj. En septembro, ĉe 31 gradoj en la kelo, kelkaj kuraĝuloj ĉeestis la kunvenon en kiu oni parolis pri siaj feriaj spertoj, ĉu en Nederlando, ĉe eksterlande. Ankaŭ la spertoj dum la UK en Torino kaj la TEJO/ILEI-kongresoj estis diskutataj kaj bildoj prezentataj.

Post instigo de Kees Ruig kelkaj geesperantistoj okupiĝis pri la Esperantistoj kiuj loĝis en Betondorp (baldaŭ 100-jara). Konataj figuroj estas W.H. Alings, Kloek kaj Minke. Ans Bakker-ten Hagen prezentis en oktobro la historion de Amsterdamo kaj precipe de la konstruado de Betondorp en la dudekaj jaroj de la antaŭa jarcento. Ŝi ne nur parolis pri la konataj Esperantistoj, sed ankaŭ pri famaj personoj kiuj loĝis tie kaj iel havis rilaton kun Esperanto (ekz.e Van het Reve, k.s.).

Ĉeestis ĵurnalisto de la ĵurnalo « Het Parool » kiu poste intervjuis Peter Ebenau, Ans Bakker-ten Hagen, Federico Gobbo kaj Bert de Wit. La 2-paĝa artikolo aperis en la ĵurnalo en mardo la 24a de oktobro.

Novembre kelkaj geesperantistoj partoprenis la klimatmarŝadon en Amsterdamo je la 12a de novembro (85.000 partoprenintoj). En la 19a de novembro Inge de Bruin-Kooij prezentis per diapozitivaj la temon « Kiel nutri la tutmondan homaron ? ».

Decembre kiel kutime estas dediĉita al la preparolado de libroj kiujn oni legis. Federico Gobbo prezentis la temon.

Dum la jaro ni perdis ankaŭ fidelan membron, nome Jan van Dijk, kiu mortis en januaro. Bert ĉeestis la funebran ceremonion en Zorgvlied-tombejo kaj kondolencis la familianojn.

## **10.6 Raporto pri Zutfena Esperanto Klubo**

En 2023 klubkunvenoj okazis proksimume ĉiujn ses semajnojn en la Zutphen-biblioteko. Ĉi tio estas agrabla loko, ankaŭ ĉar ni ne estas devigataj mendi kafon aŭ teon. Ĉiufoje estas alia temo. Ni diskutis kiel ni festas, kiel ni povas limigi la fendon inter ni kaj homoj kiuj havas malsamajn ideojn kaj pri espero. Ses membroj vizitas la klubon kaj dum la jaro ankaŭ estis kelkaj gastoj. Ni klopodis kontakti eblajn esperantistojn inter rifuĝintoj el Ukrainio, sed trovis neniun. Ni havis belan konversacion kun unu el niaj gastoj, nevino de D-ro W.J.A. Manders, kiu verkis vaste legatan libron pri Esperanto, Vijf Kunsttalen, en 1947. Ŝi jam de jaroj senpolvigis ĉi tiun libron, kiel ŝi mem diris, kaj volis scii ion pli pri Esperanto. Dum klubkunveno pri Toast Masters, iu de Toastmasters Deventer praktikigis nin pri publika parolado. Unu el niaj klubanoj poste ankaŭ fariĝis membro de tiu asocio: “Por mi la kunveno pri Toast Masters gravis kaj ekkomenciĝis nova aventuro.” La etoso estas malstreĉa kaj amika, igante ĝin perfekta klubo por lerni kaj amuziĝi.

En 2023 Foppe-Klaas Hovinga transprenis la kunordigon de la klubo de Pieter Engwirda. La klubo organizos Kulturan Tagon 2024. Pli da homoj povas aliĝi al nia klubo aŭ viziti nin. La avantaĝo, ke ne estas tre multaj homoj, estas ke ĉiuj havas sufiĉe da tempo paroli Esperanton.

*Raportas Foppe-Klaas Hovinga, kunordiganto*

## **10.7 Vlissingen**

En Zelando kelkaj Esperantistoj regule kunvenas. Ili sekvas kune la Esperanto-kurson, kiu troviĝas en la retejo Pingveno.nl. Ili sendas regule informilon al homoj en Zelando, kiuj interesiĝas pri Esperanto. Du memboj, Simon Smits kaj Ben Weber partoprenas.

## **11. Diversaĵoj**

### **11.1 Kultura tago Maastricht**

En junio 2023 okazis la Kultura Tago en Maastricht. Ron Winteraeken kaj Emil Jacibs estis la organizantoj de tiu ĉi tago. Estis ĉ. 30 partoprenantoj el Nederlando, Belgio kaj Germanio. La akcepto okazis kun kafo kaj limburga kuko en bela, interesa presartmuzeo. Post bela promenado tra historia parto sekvis agrabla restado en ĝardeno. Flandroj prizorgis libroservon. Abel Massiala gitarludis kaj kantis. Ron kaj lia amiko prizorgis tre bongustan vespermanĝon.

*Raportas Ineke Emmelkamp*

### **11.2 Libroj (malnovaj kaj novaj)**

La stoko de 'Esperanto – grammatica met oefeningen' nun troviĝis en la hejmoj de Foppe-Klaas Hovinga kaj Ineke Emmelkamp. Kelkaj ekzempleroj por disdoni troviĝas en la mansardo de la ejo Krikkenhaar. Novaj nederlandlingvaj partoprenantoj de la studosemajnfino ricevas ekzempleron. La vidvino de la filo de G.J.Degenkamp donacis grandan stokon de Esperanto-libroj, kolektitaj de G.J.Degenkamp. El tiu kolekto 140 libroj (40 kilogramoj) estas senditaj al la Koninklijke Bibliotheek. La restantaj estas disdonitaj dum la studosemajnfino. Fred de Geus helpis en tiu ĉi projekto. Ebleco por trovi bonan lokon por la ofte malnovaj libroj estas kontroli ĉu ili jam estas en la Koninklijke Bibliotheek en Hago. La arĥivo de la KB estas facile atingebla kaj kontrolebla. Ili akceptas librojn.

### **11.3 Kontaktoj kun Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) kaj Internacia Esperanto Instituto.**

Ne estis pluaj kontaktoj kun NEJ, ankaŭ ĉar ne estas klare kiu nun respondecas pri ĉi tiu organizaĵo. La estraro ofertis al la estraro de Internacia Esperanto-Instituto, kunlabori pri Zamenhof-tago 2023 sed ĝi preferis organizi pli lokan eventon por nederlandanoj.

### **11.4 Aŭtoraj rajtoj**

Ni ricevis leteron de eksterlanda kompanio kun la postulo ke ni devas pagi, ĉar ni malrespektis la aŭtoran rajton. Laŭ la postulanto ni publikigis foton sen peti permeson. Ni devis peti la helpon de oficiala advokato. Post pluraj leteroj kun la advokato kaj la kompanio ni decidis pagi pli malalaltan sumon ol postulita dirante ke tio estas nia fina decido. La kompanio poste tute ne plu reagis.

### **11.5 Baantjer – De Kock kaj la morto en preĝo**

En aprilo 2023 la traduko en Esperanto estis prezentita en la kafejo Lowietje en Amsterdamo. Peter Ebenau ekhavis la ideon traduki tipan Amsterdaman detektivan libron de Baantjer en Amsterdamo. La eldonejo donis la rajton traduki ĝin en Esperanton. La libron 'De Cock en de dood in gebed' estis elektita. Teamo kune tradukis ĝin. Federico Gobbo prizorgis la aspekton kaj enpaĝigon. La libro estas legebla en la retejo.

## **Kompilis Ineke Emmelkamp, sekretario**

La 1-an de marto 2024